

# BULTENO

de GERMANA ESPERANTA FERVOJISTA ASOCIO

Mitteilungsblatt der Vereinigung deutscher  
Eisenbahner - Esperantisten im Bundesbahn - Sozialwerk



Fondita 1952

Numero 4

Septembro/Oktobro 1982



## **26. GEFA-Jahresversammlung vom 15. - 17.10.1982 in Friedberg / Hessen**



Foto: Telkamp

**Ausflugsziel am 16. 10. 1982**

**Museumsdorf Hessenpark bei Neu-Anspach (Taunus)**

links die Dorfkirche und rechts die Bäckerei

## 26. Jahresversammlung vom 15.—17.10.1982 in Friedberg

Soweit Ihre Anmeldung beim Bba Frankfurt bereits eingegangen ist, wurden die Zimmerreservierungswünsche inzwischen vom Amt für Stadthallenverwaltung und Fremdenverkehr in Friedberg bestätigt. Nachmeldungen für Unentschlossene sind umgehend noch möglich. Falls die Zimmer in der Stadtmitte bereits belegt sind, muß auf das Beherbergungsangebot in den Außenbezirken zurückgegriffen werden.

Am Sonntag Vormittag wird ein Film vom 34. IFEF-Kongreß in Ungarn vorgeführt. Am Samstag werden Sie zu einer Besichtigung von 9—11.30 Uhr des Informationsstandes an der Schiller-Linde (Kaiserstr.) eingeladen. Den Stadtrundgang leitet ein Beauftragter der Stadt Friedberg. Für unsere ausländischen Gäste werden die Erklärungen in Esperanto übersetzt. Sollten

Sie bereits früher anreisen, bietet Ihnen der örtliche Briefmarkenverein am 14. 10. um 20.00 Uhr in der Stadthalle eine Diaschau „Esperanto auf Briefmarken“.

### ■ Wichtige Mitteilung

In der September-Nummer der Zeitschrift »Wir« wird eine Werbeanzeige von GEFA mit einem Rücksendeabschnitt erscheinen.

**Alle Mitglieder** werden gebeten mitzuhelfen, daß diese Aktion ein Erfolg wird. Setzen Sie sich bitte sofort mit Ihrem Bezirksbeauftragten in Verbindung, wenn Sie irgendwo eine positive Reaktion bemerken.

## Alproksimiĝas la 35a IFEF-kongreso

La 34a kongreso de la Internacia Fervojoista Esperanto-Federacio (IFEF) en Balatonfüred (Hungario) apartenas jam al la pasinteco, kaj ankaŭ la grandioza kongreso de la Universala Esperanto-Asocio finiĝis sukcesplene en Antverpeno (Belgio). Denove tiu lando gastigos internacian Esperanto-kongreson, nome tiun de IFEF inter la 4a kaj 10a de Junio 1983 en Oostende, la konata havenurbo ĉe la Manika Kanalo.

La organizaĵaj antaŭkondiĉoj similas al tiuj de la IFEF-kongreso en Regensburg. Proksimume 10 minutojn for de la stacidomo situas la kongresejo, la festa kaj kultura palaco. En tiu centra kvartalo troviĝas sufiĉe da hoteloj kaj pensionoj, kiuj donas litojn kaj matenmanĝon ekde 25 DM po nokto. Ĉirkaŭe situas sufiĉe da restoracioj, trinkejoj, kafejoj, butikoj kaj magazenoj. Laŭdezire LKK peras manĝkuponojn validajn en proksima restoracio.

Nur kelkajn minutojn for de la kongresejo etendiĝas la maro kaj la longa strando. Oostende estas multe vizitata urbo, pro tio oni devis transmeti la okazigon de la IFEF-kongreso de Majo al Junio. Eble tiu decido kondukos al multnombra partopreno de la IFEF-anoj, ĉar komence de Junio regas jam la somero espereble.

Intertempe la preparoj por la kongreso bone progresas, ankaŭ rilate al la kulturaj kaj turistaj programoj. Por la germanaj partoprenantoj forfalos en 1983 pasportaj formalajoj kaj precipe la longa vojaĝdaŭro. Pro tio ĉiuj anoj de nia asocio estas kore petataj aliĝi eble plej baldaŭ al 35a IFEF-kongreso. Informoj pri detaloj aperos en la venontaj eldonoj de BULTENO kaj Internacia Fervojoisto! W.B.

### IFEF-Kongreß 1983 in Belgien

Der nächstjährige Eisenbahner-Esperanto-Kongreß findet nicht im üblichen Monat Mai statt, sondern in der Zeit vom 4. bis 10. Juni 1983. Gastgebender Ort wird die belgische Hafenstadt Oostende sein.

Die Veranstaltungen finden im zentral gelegenen Fest- und Kulturpalast statt, in dessen Nähe auch die Kongreßteilnehmer problemlos untergebracht werden können. Die Übernachtungspreise einschl. Frühstück beginnen bei etwa 25 DM je Person und Nacht. Zahlreiche Geschäfte und Restaurants stehen in der Nähe des Kongreßgebäudes zur Verfügung. Das Kongreßkomitee wird auf Wunsch Mahlzeitenkupons für ein bestimmtes Restaurant ausgeben. Im übrigen werden intensive Vorbereitungen für das weitere kulturelle und touristische Programm getroffen. Einzelheiten



werden wir laufend bekanntgeben. Die Anmeldevordrucke werden in der üblichen Weise ab September über die Bezirksbeauftragten auf Anforderung ausgegeben.

Unsere belgischen Kollegen erwarten, daß in Anbetracht der günstigen Voraussetzungen wie kurze Anreise möglichst viele Deutsche am 35. Kongreß des Internationalen Verbandes der Eisenbahner-Esperantisten (IFEF) teilnehmen. W.B.

## Aus den Bezirken und Gruppen

### Frankfurt/Main

Die Hofheimer Zeitung berichtet am 3.7. unter der Überschrift „Auslandsübernachtungen zum Null-Tarif“ über den „Pasporta servo“ der Deutschen Esperanto-Jugend in Paderborn. Besonders Jugendlichen werden kostensparende Reisemöglichkeiten z. B. kostenlose Übernachtungsmöglichkeiten bei Esperantisten angeboten. Zum Erlernen der Internationalen Sprache wird der Lehrgang „Test 5000“ ebenfalls kostenlos angeboten.

Beim monatlichen Treff am 20.7. konnten bulgarische Kolleginnen und ein Gast aus Rumänien begrüßt werden. Die ausländischen Freunde haben auf ihrer Reise zum Esperanto-Weltkongreß in Antwerpen die Fahrt in Frankfurt unterbrochen.

Gernot Ritterspach führte Dias über eine Reise nach Leningrad vor und berichtete über den guten Kontakt zu Sprachfreunden (s. auch Bericht „Blankaj noktoj en Leningrad“ von Willi Barnickel auf Seite 4).

### Essen / Münster (Westf.)

Dum la lastaj jaroj vi ĉiloke trovis la raporton pri la intertempe tradicia majorkurso de la Esperanto-grupo Münster (Westf.). De multaj flankoj oni esprimis la bedaŭron, ke ĝi ĉijare ne okazis. La kaŭzo estis, ke la membroj de nia grupo dum ĉi tiu tempo ĉefe estis okupitaj kun la preparoj por la 60a GEA-kongreso kaj la GEJ-renkontiĝo je Pentekosto en Münster.

Kongresejo estis la ĉe la promenejo centre situata hotelo „Lindenhof“, kies salonoj estis tre taŭgaj por la diversaj kunsidoj, la ekspozicio, la librostandoj, la folkloro vespero, la balo kaj la diskoteko.

Kvankam estis nacia kongreso, la 250 partoprenintoj ne nur venis el Germanio.

Ekzemple salutis la kongreson gastoj el Aŭstrio, Belgio, Danlando, Francio, Japanio, Jugoslavio, Kanado, Nederlando kaj Novzelando.

La ekumenan diservon en la malgranda mezepoka preĝejo St. Servatii celebris Patro Willibald Kunighk kaj Pastro Böning.

La urbestro de Münster akceptis ĉiujn kongresanojn en la fama vidinda urbdomo, en kiu oni kontraktis la pacon post la 30jara milito.

Ĉe la distra vespero folkloro grupo el Münster muzikis kaj dancis en vestfalia maniero. En tute alian regionon kondukis la kongresanojn la inter fervojistoj jam konata kaj tre ŝatata franca grupo kun siaj dancoj kaj skeĉoj.

Dum la balo okazis riĉe ekipita lotumo por la favoro de „Bona Espero“ kaj „Test 5000“.

En la kongreslibro inter aliaj gravaĵoj oni legis, ke laŭ trafa diraĵo en Münster aŭ sonorlas la preĝejo-sonoriloj aŭ pluvas. Feliĉe dum Pentekosto ofte estis aŭdeblaj la sonoriloj kaj la suno brilis de blua ĉielo.

La kongresanoj esprimis la admiron pri la rava urbo kaj ties regiono, kun kiu ili konatiĝis dum aŭtobusveturado al unu de la multnombraj akvokasteloj ĉirkaŭ Münster.

Gazetaro kaj Radio vekis per siaj raportoj pozitivan eŝion ĉe la civitanoj de Münster. Ankaŭ ĉe la informstano en la urbo oni rimarkis la intereson. Espereble ni revidos grandan parton de la interesuloj ĉe la venonta Esperantokurso.

USchr

## Nekrologo

La grupo Herzberg/Harz perdis nian membrinon

**Margarete Lünstedt.**

Ni esprimas nian kondolencan al la familio.

**GEFA-estraro**

**Redaktfino por n-ro 5/82 estas  
la 10an de Novembro 1982**

## Blankaj noktoj en Leningrad

Depost preskaŭ jardekoj sovetaj litvagonoj cirkulas de oriento al okcidento kaj inverse. Unu vagonkurso interligas Köln kaj Leningrad, kaj ĵus tiun vagonon mi elektis dum tiu somero por viziti la faman urbon Lenningrad, kiun oni prave nombras al la plej belaj metropoloj en la mondo. Forgesitaj estis la longdaŭraj preparoj, la parte severaj kontroloj de la ŝtataj limorganoj aŭ la teda interŝanĝo de la vagonaksoj en la pola limstacio, kiam la vagonaro finis sian dutagan veturadon en la varsovia stacio Leningrad.

Precize antaŭ mia litvagono atendis dungitino de la ŝtata organizaĵo Intourist por akompani min al aparta taksio, antaŭpagita sed bonvena servo, kiu ŝparis multe da tempo, ĉar ne ekzistas sufiĉe da normalaj taksioj. La mendita hotelo situas en la urba centro apud la fama St. Isaak-katedralo. Ĝi multe similas al la katedralo St. Petro en Romo. Centoj da homoj pacience atendis ĉiutage por rigardi kontraŭ pago la internon, kiu pro konataj kaŭzoj servas nuntempe nur kiel muzeo.

Kiel individua turisto mi ne estis submetita al iu deviga programo. Sed helpe de tiaj esperantistoj mi povis plenumi ampleksan vizitprogramon. Dum Julio regas la t.n. blankaj noktoj, dum kiuj la taga heleco restas ĝis noktmezo. Bonŝance la lumo de la suno daŭre brilis. Kompreneble ne mankis la vizito al la vintra palaco, la t.n. Eremitage, kun ĝiaj abundaj kolektaĵoj je okcidenteŭropaj pentraĵoj. Starante sur la granda placo oni sentas iom pri la genia konstruaro de precipe italaj arkitektoj. Ŝipekursoj sur la rivero Neva kaj sur la kanaloj fortigis tiun impreson. Pluaj vizitceloj estis la someraj rezidejoj el la cara epoko, Petro-korto kaj Puŝkin. Kun multe da peno kaj kapableco oni ankoraŭ restaŭras la imensajn damaĝojn, kiuj ekestis antaŭ 40 jaroj dum la 900taga sieĝo de la germanaj soldatoj. La neforgeseblaj tagoj finiĝis per vizito al la baleta vespero „Cignolago“. Kun sincera danko pro la Esperanto-helpo mi returnis.

W.B.

## Ankoraŭfoje ni mencias:

La broŝuron „La verda relo“, 56 paĝojn, bonvolu mendi ĉe s-ino Elfriede Kruse, Wiener Strasse 121, D-6000 Frankfurt/M. 70 kaj samtempe ĝiru 15,— GM al Sparda-Bank Frankfurt, poŝtĉeka konto 569 08 Frankfurt favore al Elfriede Kruse, konto 129957.

## Seminarioj

Por lerni la internacian lingvon, plispertiĝi, praktiki kaj partopreni diskutadondojn, regule okazas seminarioj en Langen (Hesio), 10 km sude de Frankfurto. Kursoj por komencantoj kaj progresintoj, ankaŭ por viaj infanoj apartaj kursoj. Niaj konstantaj kursgvidantoj: S-ino Elisabeth Ritterspach, S-ro Gernot Ritterspach, S-ro Kurt Fischer, S-ro Wolfgang Schwanzler, S-ro Manfred Führer, S-ro Eckhard Woite, S-ino Martina Woite kaj aliaj.

La venontaj seminarioj:

01. — 03. Oktobro 1982

19. — 21. Novembro 1982

## Nova adreso de libroservo

Manfred Führer

Renneroder Str. 22

6000 Frankfurt am Main 80

Petu informojn kaj libro-oferton!

Wir begrüßen unsere neuen Mitglieder aus den Bezirken

Essen

Horst Ortmann, In der Mark 201,

5801 Witten-Annen

Hilger Margarete, Wallauer Str. 20,

6238 Hofheim-Langenhain/Ts

Kögler Günther, Tausuring 2,

6362 Wöllstadt 2

Müller Johann, Berliner Str. 35,

6374 Steinbach/Ts

Wir empfehlen unseren neuen Freunden zur Weiterbildung den Eisenbahner-Esperantisten-Briefwechsel. Nähere Ausführungen bitte Bulteno 3/82 Seite 12 entnehmen.

## Korespondon deziras

Souček Miloslav, Gottwaldova 257,

CS-56164 Jablonné n. Orlicé

(Tschechoslowakei).